

Akademia decido pri stataj adjektivoj derivitaj de statŝanĝaj verboj

A. La Akademio de Esperanto konstatas,

1. ke en la lingvouzo de nemalmultaj esperantistoj ekzistas kelkaj adjektivoj (ekzemple *morta*, *korekta*, *komplika*, *fiksa*, *malferma* kaj *veka*), kiuj estas formitaj el verba vortobazo¹ kaj la adjektiviga finaĵo *-a*, kaj kies signifo (aŭ unu el kies signifoj) estas la stato rezultanta el la ago nomata de la verbo;
2. ke ne regas konsento inter la parolantoj de Esperanto – eĉ ne inter spertaj parolantoj de Esperanto – pri la demando ĉu ĉi tiuj *rezultstataj adjektivoj*² estas ĝustaj aŭ eraraj, ĉu ili estas parto de bona lingvouzo aŭ evitindaj neregulaĵoj.

B. Esplorinte la problemon en sia tuteco el diversaj vidpunktoj, la Akademio aldone konstatas,

1. ke la ĝenerala regula signifo de adjektivoj de la formo *V-a*, kie *V* estas verba vortobazo, estas ‘rilata al aŭ karakterizata de *V-o*’³;
2. ke ĉi tiu ĝenerala signifo povas plipreciziĝi laŭ la kunteksto kaj laŭ la signifo de la vortobazo *V*, ekzemple ĉe *nutra*, kiu ofte estas uzata en la senco ‘taŭga por nutrado’;
3. ke ĉe verba vortobazo *V* indikanta statŝanĝon, la signifo de *V-a* ne povas plipreciziĝi al signifo simila al *V-ita* aŭ *V-inta*, kiu indikas la staton rezultantan el la ago *V-i*, ĉar tia plipreciziĝo kontraŭas la ĝeneralan signifon de *V-a*, nome *rilata al aŭ karakterizata de ia statŝanĝo*;
4. ke la kontestataj rezultataj adjektivoj kiel *morta*, *korekta*, *komplika*, *fiksa*, *malferma* kaj *veka* estas formitaj el verboj kun statŝanĝa signifo, kaj sekve ne povas regule indiki la staton rezultantan el la koncernaj agoj;
5. ke ĉi tiu malkohereco de la kontestataj rezultataj adjektivoj kun la kutima signifo de deverbaj adjektivoj estas en la plej oftaj okazoj klarigebla surbaze de la ekzisto de similformaj nacilingvaj adjektivoj kun la kontestata rezultata signifo;
6. ke la rezultataj adjektivoj kontribuas al tio, ke homoj uzas klare malĝustajn formojn kiel *korektigi*, *komplikigi* kaj *vekigi* (en la sencoj de *korekti*, *kompliki* kaj *veki*), kiuj minacas la oficialan kaj kutiman bazan signifon de tiuj radikoj;
7. ke kelkaj el tiuj kontestataj rezultataj adjektivoj (precipe *morta*, *korekta*, *falsa* kaj *komplika*) estas jam delonge forte enradikiĝintaj en la lingvouzo de spertaj parolantoj de Esperanto, tiel ke oni ne povas senprobleme stampi ilin kiel erarajn, sed prefere nomu ilin tradiciigintaj nekoheraĵoj;
8. ke ĉiuj ĉi konstatoj aplikiĝas egale al la koncernaj adverboj kiel *korekte*, *komplike* ktp (la ĝenerala signifo de adverbo de la formo *V-e*, kie *V* estas verba vortobazo, estas *en maniero rilata al aŭ karakterizata de V-o*).

C. Surbaze de ĉi tiuj konstatoj la Akademio

1. rekomendas, ke al lernantoj de Esperanto oni ne prezentu la kontestatajn rezultatajn adjektivojn kiel ekzemplojn de regula vortfarado; anstataŭe, se oni instruas ilin, oni klarigu ilin kiel tradiciigintajn esceptojn al la kutimaj reguloj de vortfarado per la finaĵo *-a*;
2. esprimas sian subtenon al tiuj Esperantistoj, kiuj penas eviti tiujn kontestatajn rezultatajn adjektivojn, samtempe agnoskante, ke la uzo de la pli enradikiĝintaj rezultataj adjektivoj estas tolerebla ĝuste pro tio, ke ili enradikiĝis en la efektivan lingvouzon;

1 alivorte el verba radikalo, do el verba radiko aŭ el kunmetaĵo de vorteroj kune kondukantaj kiel verba radiko

2 Por simpligi la priskribon, ni ĝenerale uzas la esprimon *rezultata adjektivo* kiam ni parolas pri uzo de deverba adjektivo, kiu celas la staton, kiu rezultas el la ago nomata per la verba vortobazo. La samaj adjektivoj ankaŭ povas havi ne rezultatajn uzojn, pri kiuj ĉi tiu decido tamen ne temas.

3 Plej ofte la substantivo *V-o* derivita de verba vortobazo *V* signifas ‘la ago *V-i*’. Foje tiaj deverbaj substantivoj tamen povas nomi ne nur agon, sed ankaŭ aĵon, ekzemple *deseĝno*, *eraro* kaj *mallongigo*. La Akademio per ĉi tiu decido ne alprenas starpunkton pri la demando, ĉu ĉe verbobazo *V*, por kiu *V-o* havas ankaŭ aĵan signifon, la regula signifo de *V-a* estas nur ‘rilata al aŭ karakterizata de la ago *V-i*’, aŭ ĉu ankaŭ ‘rilata al aŭ karakterizata de la aĵo nomata *V-o*’ estas regula signifo de *V-a*. Kiel klarigite pli detale en Sekcio E, tio signifas, ke la Akademio per ĉi tiu decido ne alprenas decidon pri la reguleco de la stataj signifoj de

3. tute malaprobas la uzon de formoj kiel *korektigi*, *komplikigi* kaj *vekigi* en la sencoj de *korekti*, *kompliki* kaj *veki*.

D. Aldonaj konsideroj kaj argumentoj, kiuj pravigas la ĉi-suprajn kaj ĉi-subajn konstatojn kaj rekomendojn, troviĝas en la aparta dokumento *Aldonaj klarigoj pri la Akademia decido pri stataj adjektivoj derivitaj de statŝanĝaj verboj*.

E. La Akademio kompilis la ĉi-suban liston de adjektivoj, el kiuj kelkaj estas fojfoje uzataj kun neregula rezultata signifo, kaj aliaj estas regulaj adjektivoj, kiujn eble iuj povus opinii neregulaj surbaze de niaj ĉi-supraj klarigoj. La listo klarigas, kiuj signifoj de adjektivoj estas efektive neregulaj, kaj donas aldonajn informojn pri la unuopaj adjektivoj. Krome, ĉe la efektive neregulaj adjektivoj ĝi mencias eblajn alternativajn esprimojn, kiujn oni povas uzi por eviti la koncernajn uzojn tiuj adjektivoj. La listo traktas ĉefe la rezultatajn signifojn de la koncernaj adjektivoj; sekve, se adjektivo estas menciita sen precizigo de la intencita signifo, ĉiam estas intencita ĝia rezultata senco.

abstrakt/a

Kelkaj vortaroj, ekzemple la Plena Vortaro, listigas *abstrakt/i* kiel bazan formon de *abstrakt/*. Sekve, laŭ tiuj vortaroj ŝajnas ke *abstrakt/a* ankaŭ estas rezultata adjektivo, al kiu povus aplikiĝi ĉi tiu Akademia decido. Tamen la 1a Oficiala Aldono atribuas al la radiko *abstrakt/* nur la multe pli oftan signifon de la adjektivo *abstrakta* en ties kutima signifo, kiu do ne estu kontestata.

Aliflanke, la verbo *abstrakti* devas, laŭ la kutimoj de la Esperanta derivado, signifi ‘esti abstrakta’.

Same regula estas la uzo de *abstraktigo*, kiel en la jena reallingva ekzemplo: “La nocia pensado aperas nur ĉe la homo. Ĉe tiu ĉi pensado oni operacias per nocioj kiel rezultoj de *abstraktigo*.”

En ĉi tiu rekomendinda uzo la vorto *abstrakta* kaj ties derivaĵoj estas plene simetriaj al ĝia kontraŭo *konkreta*.

difekt/a

difekt/ estas unu el tiuj verbaj radikoj, kies substantivigo (*difekto*) povas signifi ne nur agon, sed ankaŭ (kaj fakte plej ofte) aĵon. Sekve al ĝi aplikeblas la rimarkoj el piednoto 3: Oni povus defendi la rezultatan signifon de *difekta* surbaze de la interpreto *rilata al aŭ karakterizata de difekto(j)*, sed kiel klarigite en piednoto 3, la Akademio per ĉi tiu decido ne alprenas starpunkton pri la demando, ĉu ĉi tia interpreto estas regula aŭ ne. Se oni volas eviti *difekta*, oni povas uzi ekzemple *difektita*, *difektohava*, *mankohava*, *nefunkcianta* aŭ *neuzebla*.

fals/a

Aldone al tio, ke *falsa* estas unu el la rezultataj adjektivoj plej forte enradikiĝintaj en la efektivan lingvouzon, la Akademio jam en la Baza Radikaro Oficiala de 1969 deklaris ĝin dukategoria radiko, kiu do havas du bazajn signifojn, unu agan kaj unu ecan, ne regule deriveblajn unu de la alia. La Akademio nun decidis ne malfari tiun decidon, sed nur pliprecizigi ĝin per oficiala difino de la radiko. La oficialigita eca signifo de *fals/* estas *malaŭtentika*, *falsita*, dum la fojfoje renkontataj signifoj *malĝusta*/*malvera* kaj *prezanta la veron mensoge/erare* estis malrekomendataj.

fals/ havas do iom specialan statuson kiel oficiale dukategoria radiko. Se oni tamen volas uzi ĝin nur verbkaraktere, oni povas uzi *malaŭtentika* aŭ *falsita* por la oficialigita signifo de *falsa* kaj *malĝusta*, *malvera*, *mensoga* kaj *erariga* por la malrekomendataj signifoj de *falsa*.

ferm/a

La verbo *fermi* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *ferma* kun la rezultata signifo simila al

‘fermita’ ne estas regula. Tiu signifo de *ferma* ŝajne ne aperis en Esperanto pro nacilingva influo, sed pro analogeco al *malferma* (kiu ja klarigeblas per nacilingva influo). Laŭ tekstara esploro, ĝi estas la plej maloftaj el la ĉi tie listigitaj rezultstataj adjektivoj. Pro tio ĝi ne estas pravigebla per la lingva tradicio, kaj la Akademio tute malrekomendas ĝin. Plej ofte taŭgas kiel alternativo la participo *fermita*. Tamen fojfoje povas ĝeni, ke laŭ la kutima signifo de *-it-*, io nur povas esti fermita se ĝi antaŭe estis malfermita; ekzemple okuloj de hundidoj, kiuj ĝis nun neniam malfermis siajn okulojn, laŭ tiu logiko ne povas esti konsiderataj fermitaj. Ofte tiu signifero de *fermita* estas ignorata en la efektiva uzo, kaj *fermita* estas simple uzata por priskribi staton sen konsidero pri antaŭa statŝanĝo. Sed kiam tiu signifero de *fermita* efektive povas kaŭzi miskomprenon, eblas uzi la alternativon *nemalfermita*.

fiks/a

La verbo *fiksi* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *fiksa* kun la rezultstata signifo simila al ‘fiksita’ ne estas regula.

Multaj uzoj de *fiksa* kaj *fikse* estas en esprimoj kiel *fiksa rigardo* kaj *fikse rigardi*. Kelkaj naciaj lingvoj havas similsignifajn esprimojn, kie en la loko de *fiksa* aperas vorto kun signifo simila al *fiksita* (ekzemple la franca “regard fixe”). Pro tio oni povus emi interpreti tiujn uzojn de *fiksa* kiel rezultstatajn uzojn. Tamen ankaŭ eblas interpreti *rigardi ion fikse* kiel ‘rigardi fiksante sian rigardon sur io’. Laŭ ĉi tiu interpreto, la esprimoj *fikse rigardi* kaj *fiksa rigardo* ne baziĝas sur rezultstata uzo de *fikse/fiksa*. Tiuj uzoj de *fikse* kaj *fiksa* do estas regulaj kaj ne kontestindaj.

Tamen fojfoje *fiksa* aperas ankaŭ en vere rezultstata uzo, ekzemple en esprimoj kiel *fiksa ideo* aŭ *fiksa prezo*. Taŭgaj alternativaj esprimoj por tiaj neregulaj uzoj estas *fiksita*, *firma* aŭ *konstanta*.

fuŝ/a

fuŝ/ estas unu el tiuj verbaj radikoj, kies substantivigo (*fuŝo*) povas signifi ne nur agon, sed ankaŭ aĵon. Sekve al ĝi aplikeblas la rimarkoj el piednoto 3: Oni povus defendi la rezultstatan signifon de *fuŝa* surbaze de la interpreto *rilata al aŭ karakterizata de fuŝo(j)*, sed kiel klarigite en piednoto 3, la Akademio per ĉi tiu decido ne alprenas starpunkton pri la demando, ĉu ĉi tia interpreto estas regula aŭ ne. Se oni volas eviti *fuŝa*, oni povas uzi ekzemple *malbona*, *aĉa* aŭ *fuŝita*.

kaŝ/a

Multe pli ofta ol la adjektivo *kaŝa* estas la adverbo *kaŝe*. Ĝi kutime havas signifon samtempe proksiman al *kaŝante sin* kaj al *kaŝate/nevideble/nerimarkeble*. Tiu uzado de *kaŝe* ne estas rezultstata kaj ne estu kontestata. Inter la uzoj de *kaŝa* simile troveblas kelkaj uzoj nekontestindaj: Temas unuflanke pri uzoj kun senco simila al *sin kaŝanta*, ekzemple “la regantoj estas mem regataj de kaŝaj fortoj”, kaj aliflanke pri uzoj kiuj priskribas agon, kies subkomprenata aganto mem kaŝas sin aŭ ion, ekzemple “kaŝaj renkontiĝoj” kaj “kaŝaj manieroj agi”. Tamen fojfoje *kaŝa* estas uzata en la problema rezultstata signifo de *kaŝita*, ekzemple “okazis skandalo pri la kontraŭleĝaj kaŝaj kasoj de la partiestro”. Taŭga alternativo por tiaj okazoj estas *kaŝita*.

komplik/a

La verbo *kompliki* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *komplika* kun la rezultstata signifo simila al ‘malsimpla’ ne estas regula. Depende de la kunteksto, taŭgaj alternativaj esprimoj estas *malsimpla*, *malfacila* aŭ *komplikita*.

konfuz/a

konfuz/ estas verba radiko kaj havas tri klare distingeblajn signifojn:

1. malordigi/malklarigi (*konfuzi pensojn, eldirojn aŭ ideojn*)
2. kaŭzi malklarecon en la menso de iu (*konfuzi personon*)
3. ne kapabli distingi (*konfuzi du aferojn*)

konfuza havas en la efektiva lingvouzo du klare distingeblajn signifojn:

1. tia, ke ĝi povas kaŭzi malklarecon en la menso de iu (*konfuzaj ideoj, eldiroj*)
2. havanta malklarecon en sia menso (*konfuza persono*)

La unua senco de *konfuza* estas regula adjektivigo de la dua senco de *konfuzi*, sed la dua senco de *konfuza* nur klarigeblas en rezultata maniero kaj sekve estas neregula. Taŭga alternativo estas *konfuzita*.

korekt/a

La verbo *korekti* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *korekta* kun la rezultata signifo simila al ‘senerara’ ne estas regula. La alternativaj esprimoj, kiuj plej bone trafas ĉi tiun rezultatan signifon de *korekta* estas *senerara* kaj *laŭregula*. Tamen ankaŭ la iomete alisignifa vorto *ĝusta* tre ofte taŭgas kiel alternativo al *korekta*. Kiam oni parolas pri personoj, krome ofte taŭgas unu el la alternativoj *senriproĉa, bonkondata, morkonforma, honesta* kaj *ĝentila*.

korupt/a

Tradicie Esperantaj vortaroj listigas *korupt/* kiel verban radikon, kaj tiam la kutima uzado de *korupta* ŝajnas rezultata. Sed post zorga studado de la efektiva lingvouzo de *korupt/* fare de bona aŭtoroj, la Akademio konstatis, ke substantiva karaktero pli bone klarigas ĝian kutiman funkciadon, kaj sekve oficiale deklaris ĝin substantiv-karakteran, samtempe provizante ĝin per oficiala traduko. La kutima uzo de *korupta* do ne estas kontestinda.

mal/ferm/a

La verbo *malfermi* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *malferma* kun la rezultata signifo simila al ‘malfermita’ ne estas regula. Plej ofte taŭgas kiel alternativo la participo *malfermita*. Tamen ĝi fojfoje povas kaŭzi problemon similan kiel tiu menciita pri *fermita* ĉi-supre sub **ferm/a**. Tiam eblas uzi *nefermita*.

miks/a

miks/ estas unu el tiuj verbaj radikoj, kies substantivigo (*mikso*) povas signifi ne nur agon, sed ankaŭ aĵon. Sekve al ĝi aplikeblas la rimarkoj el piednoto 3: Oni povus defendi la rezultatan signifon de *miksa* surbaze de la interpreto *rilata al aŭ karakterizata de mikso(j)*, sed kiel klarigite en piednoto 3, la Akademio per ĉi tiu decido ne alprenas starpunkton pri la demando, ĉu ĉi tia interpreto estas regula aŭ ne. Se oni volas eviti *miksa*, oni povas uzi *miksita*.

Kunmetaĵoj kiel *miksrasa* kaj *miskolora* estas ĉiukaze pravigeblaj surbaze de la substantivo *mikso*, kaj do ne estas kontestindaj.

mort/a

La verbo *morti* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *morta* kun la rezultata signifo ‘malviva’ ne estas regula. Taŭgaj alternativoj estas ‘malviva’ kaj ‘mortinta’.

vek/a

La verbo *vek* indikas statŝanĝon, kaj sekve la uzo de *veka* kun la rezultata signifo simila al ‘ne dormanta’ ne estas regula. La verbo *maldormi* kaj la esprimo *ne dormi* estas taŭgaj alternativoj al *esti veka*. Kiam *veka* ne estas uzata kombine kun *esti*, taŭgaj alternativoj estas *maldorma* kaj *maldormanta*. Krome en kelkaj kuntekstoj ankaŭ taŭgas la alternativoj *vekiĝinta* kaj *vekita*.